Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2015

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2015 okazis entute 14 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj neniu estrara kunveno, kvankam la estraro tamen komunikis.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 5 kaj 9 membroj, meznombre 6,6 (la mezaj nombroj por la jaroj 2006–2014 estis respektive: iom malpli ol 7; inter 6 kaj 7; 6,6; 6,5; 7,1; 6,9; 6,9; 7,4; kaj 6,8 en 2014). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post (parte eĉ dum) la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. Komence de pluraj kunvenoj okazis vortaraj kvaronhoroj (vd. sube). La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo *Næring og samfunn*. Temoj en 2015 estis:

– 10.2.: *Spertoj pri incendio*. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen rakontis pri la incendio en Risvollan.
– 24.2.: *Ni traduku aktualaĵon de hodiaŭa gazeto*. Torstein Kvakland ekzercigis nin.
– 17.3.: *Plutono – la inta planedo*. Herman Ranes prelegis pri astronomio.
– 7.4.: *Ni planas la programon por la Landa Kongreso*.
– 21.4.: *Ni lernu iomete de la franca per Esperanto*. Jørgen G. Bosoni instruis okaze de la UK en Francio.
– 5.5.: *Diskuto pri vortaraj aferoj*.
– 19.5.: *Planoj pri la somera laboro ĝardena*. Torstein Kvakland klarigis kaj ĉiĉeronis en la ĝardeno.
– 2.6.: *Planado de la venonta landa kongreso de NEL*.
– 6.10.: *Tutvespera vortara laboro*. Subgvide de Jørgen G. Bosoni ni diskutis malfacile tradukeblajn vortojn.
– 20.10.: *Raportoj pri UK kaj movadaj novaĵoj*. Bildoj kaj filmoj de Herman Ranes, Judith P. kaj Jardar E. Abrahamsen.
– 3.11.: *Ĉiuj prezentas ion dum kvin minutoj.* Efektive estis pli ol kvin minutoj.
– 17.11.: *Ĉiuj parolas pri io dum kvin minutoj.* Aŭ pli longe.
– 1.12.: *Esperanto inter blinduloj*. Kjell Heggvold Ullestad prelegis pri la historio de Esperanto inter blinduloj, precipe en Norvegio.
– 8.12.: *Ponduskunveno*. Judith P. Abrahamsen preparis novajn Pondus-striojn por traduko.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2015, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj de GET en la gazetaro.

Membrostatistiko

Fine de 2015 GET havis 16 membrojn (por la jaroj 2006–2014 la nombro estis: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, kaj 15 en 2014).

Partopreno en naciaj aranĝoj

Entute 7 GET-anoj partoprenis la Landan Kongreson de NEL la 12an–14a de junio 2015: Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen, Christian Fossen, Torstein Kvakland, Herman Ranes (ĉefa organizanto), Ulf Stenhaug kaj Kjell Heggvold Ullestad. La Landa Kongreso okazis en BUL-hytta en Trondheim,

kaj la ĉeestantoj partoprenis kaj la ĝardenan feston de GET (hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen) kaj ekskurson al la trama muzeo.

Partopreno en internaciaj aranĝoj
Kvin GET-anoj partoprenis la Universalan Kongreson en Lillo: Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen, Christian Fossen, Torstein Kvakland kaj Herman Ranes.

Vortara laboro
Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Komence de multaj klubkunvenoj okazis vortara kvaronhoro, en praktiko ofte duonhoro, dum kiuj la membroj uzis poŝvortarojn (la norvegan–anglan parton de ambaŭdirekta vortaro, plurekzemplere) por trovi norvegajn vortojn kiuj mankas en nia vortara datumbazo. Okazis ankaŭ propraj vortaraj klubkunvenoj.

Interreta aktivado
GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Asistis Judith Parelie Abrahamsen. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 20 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2014 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, kaj 22 en 2014). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2015 sendiĝis 56 mesaĝoj per la listo (2014: 45; 2013: 96; 2012: 68).

Biblioteko kaj aliaj libroj
La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. Oni ne registris pruntedonojn en 2015, sed du pruntitaj libroj reliveriĝis, kaj donaciĝis ekzemplero de la VHS-vidbenda kurso «Mazi en Gondolando». Pro praktikaj hazardaĵoj tiuj tri ankoraŭ restas eksterlibruje.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007. Dum la jaroj, libroj el tiu valizo disdonaciĝis kiel premioj dum la Zamenhofaj festoj, kie kutime okazas lotumado.

Arĥivo
La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj
Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2015.

Ekstera mono
Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2015 Norsk Tipping pagis al la klubo 2182,75 kronojn (2234,75 en 2014). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet næring og samfunn*, kiu dum 2015 pagis al la klubo 1360 kronojn (1140 en 2014).

Postenoj

Estraro dum 2015, elektita de la Jarkunveno la 24an de marto 2015
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 24an de marto 2015
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2015
Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

Estraraj postenoj de klubanoj en NEL en 2015
Prezidanto de NEL (ĝis junio): Jardar Eggesbø Abrahamsen
Vicprezidanto de NEL (ekde junio): Jardar Eggesbø Abrahamsen
Vicprezidanto de NEL (ĝis junio): Ulf Chr. Lunde (loĝas en Os en Hordaland)
Sekretario de NEL (ekde junio): Ulf Chr. Lunde
Vicrevizoro de NEL (ĝis junio): Ulf Stenhaug
Vicrevizoro de NEL (ekde junio): Jørgen Åldstedt
Revizoro de NEL (ekde junio): Ulf Stenhaug

Anstataŭanto al la estraro de NEL (ĝis junio): Herman Ranes
Estrarano de NEL (ekde junio): Herman Ranes
Anstataŭanto al la estraro de NEL (ĝis junio): Hilde Lagnason Bye
Estrarano de Legaco Uhlen: Torstein Kvakland
Estrarano de Legaco Uhlen (ĝis junio): Arne Olav Mjøen (kun forpermeso)
Estrarano de Legaco Uhlen (ekde junio): Ulf Stenhaug
Persona anstataŭanto por Torstein Kvakland en Legaco Uhlen: Judith Parelie Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2015
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad
Revizoro de NJE: Ulf Stenhaug
Vicrevizoro de NJE (ĝis junio): Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2015
Elekta komitato de NEL (ĝis junio): Christian Fossen
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, anstataŭanto Herman Ranes
Komisionanoj pri novaj laborplano kaj strategia plano de NEL (ekde junio): Torstein Kvakland kaj Judith Parelie Abrahamsen
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen

Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Chr. Lunde (komputiko, loĝas en Os) kaj Jardar E. Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 23an de februaro 2016.